

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 7 fkoj
Bonfara : 12 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1969 2

KULTURAJ KAJEROJ

1969 MARTO-APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Pri Gresillon
Tre junaj esperantistoj en Gresillon — F. Le Magadure

Tra la Mondo — A. Frangeul

Ĉu vi konas Tiĉinon (fino) — P. Métivier

La Kanto de l'Mondo — de Jean Lurçat (trad. B. Cheverry)

La cikonio (fino) — (trad. S. G.)

Aspektoj de Usono.

Iom da scienco
La Brul-piloj (1a parto)
R. Jacquesson - J.-P. Guillot.

Fantaziaĵo
Kazimiro — Jenö Heltai (trad. Laszlo Somlai)

Por via distro
Nia konkurso — P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

Pri Gresillon

— Ŝajnis al ni interese publikigi tiun raporton de Sro Le Magadure. Temas pri la seminario por kurs — kaj grup — gvidantoj, kiu okazis en Februaro. Simila seminario okazos ankaŭ fine de Aŭgusto.

TRE JUNAJ ESPERANTISTOJ EN GRESILLON

Okaze de Seminario por esperanto-kursgvidantoj, 13 junaj esperantistoj, 9-jaraj, el Hennebont, plezure fariĝis lernantoj de la geinstruistoj kiuj faris prov-lecionojn en Grésillon, de la 23an de februaro ĝis la lan de marto.

Nia vojaĝgrupo konsistis el 13 lernantoj, unu akompananto, 18 jara, kaj mi mem.

Ĉiuj estis volontuloj kaj pro tio, bonhumoro, gajeco, kuraĝo ĉiam intermiksiĝis.

Ĉiumatene, la infanoj lernis esperanton, ĉu per rekta metodo, kun Sinjorino Tresorier, ĉu per aŭdovida metodo, kun Sinjorino Humm, ĉu per rekta metodo laŭ la plano de Junulkurso ; kelkfoje ni uzis la okazaĵojn : unu leciono sin apogis sur nia vizito al la dolmeno, kaj alia sur letereto de gesinjoroj Fort. La lecionoj ĉiam finiĝis per kantetoj.

Post la kursoj, la infanoj povis kuradi tra la parko kaj la arbaro, ludi tablotenison, amuziĝi en la ludoparko... Tio donis bonan apetiton al ili.

Posttagmeze, ni profitis la belan veteron por fari vizitojn ekster Grésillon : ni iris al la dolmeno, en kies arbaro ni multe kuradis, ni vizitis, en Baugé, la kastelon, la mirindan apotekon de la malsanulejo, modernajn vintroĝardenojn de la familio Triolet, kiu praktikas la biologian kultivadon sen kemiaj sterkoj, ni vojaĝis al la Zoologia Ĝardeno en La Flèche. Ofte, pluraj ĉeestantoj akompanis nin ; preskaŭ ĉiuj Grésillonanoj partoprenis la ekskurson al la Zoologia Ĝardeno.

Dum tiu semajno, ni ricevis ankaŭ viziton de novaj geesperantistoj el Baugé, kaj ilia grupo arigis kelkajn geknabojn, neesperantistojn, kiuj venis, iun posttagmezon, por sekvi unuan lecionon de la CSEH-metodo, gvidatan de Sinjorino Tresorier.

Niaj junaj esperantistoj plezure lernis kaj respondis al la demandoj, entuziasme kantis, ludis, kuris... La restado en Grésillon estas por ili bonega travivaĵo, kaj la rakontoj, hejme, kontentigis la gepatrojn.

Poste, ni kunvenigis ĉiujn en nia lernejo por rigardi la diapozitivojn rilate al tiu restado : el la okuloj kaj el la diroj entuziasmo eksplodis.

Krom la esperantolecionoj kaj la pedagogia aspekto de la afero, la geinstruistoj interŝanĝis ideojn kaj spertojn pri starigo de kursoj kaj vivo de grupoj.

Pri la financaj rimedoj, ni devas precizigi ke ni ricevis helpon de hennebonta asocio pri popola edukado, kies membroj ni estas. Niaj lernantoj lernas esperanton en la lernejo, sed tamen ili estas membroj de tiu asocio, kiu povas peti subvencion de la departementa direkcio pri junularo kaj sportoj. Nia asocio pagis la vojaĝon, la gepatroj pagis nur la koston de la restado en Grésillon.

Ĉio estas kuraĝiga por ni kaj estus dezirinde, ke aliaj grupestroj kaj kursestroj pripensu kaj travivu similan provon. Ni ne bedaŭras niajn klopodojn. Ni restas je la dispono de ĉiuj kiuj deziras aliajn klarigojn pri tiu eksperimento.

F. LE MAGADURE, Instruisto,

Lernejo Jean-Macé, 56 - Hennebont.

Esperanto tra la Mondo ★

U.K. en Helsinki. — En la programo troviĝas aparta finna vespero kun popolmuziko, popolaj dancoj, prezento de eltiraĵoj el « Kalevala » kaj aliaj folkloraĵoj.

Nova turisma ero : 4-11 de aŭgusto : ŝipkrozado sur la finnaj lagoj.

La unuan fojon okazos debata vespero. La temo estos : « Esperanto, ĉu ideologia aŭ praktika instrumento ? »

La temo de la unua ĝenerala kunveno de U.E.A. estos : « La lingva problemo en la kadro de la monda politiko kaj la taskoj kaj idea bazo de niaj organizaĵoj. »

Ĉefa temo de la Junulara Kongreso (3-10 de aŭgusto en Tyreso, apud Stokolmo) : « Junularo kaj socio ». Adreso : 25-a IJK, Myggdalsvagen 123, 135 00, Tyreso.

El Jugoslavio. — Nova esperanta ferio-centro situas sur la okcidenta marbordo de la duoninsulo Istrio. Petu la faldfolion kaj kondiĉojn al : Esperanta Societo, Ljubljana, Tavčarjeva 2/1, pf 401. Ĝi disponas pri tri grandaj vilaoj.

El Sovetunio. — Unu el la respublikoj de la Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj, nome Litova S.S.S. ĵus enkondukis la instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto en mezgradajn lernejojn. Ĝis antaŭ nur kelkaj monatoj, neniu lernejo en la tuta Soveta Unio instruis oficiale la lingvon. Laŭ la nova programo, Esperanton povas lerni la klasoj 7-a ĝis 11-a. La instruado estas fakultativa. La oficiala kurso konsistas el 52 lecionoj po 1 1/2 horoj semajne. La ministeria dokumento atentigas, ke la Internacia Lingvo estas la lingvo plej rapide lernebla el ĉiuj lingvoj en la mondo kaj ke ĝi donas bonan bazon por posta lernado de aliaj lingvoj.

El Vatikano. — Nova vatikana dekreto permesas multe pli vastan uzon de la Internacia Lingvo Esperanto en la katolika liturgio. Ĝi etendas la permeson al multe pli granda parto de la meso ol antaŭe kaj al ĉiuj grupoj kunvenantaj, kie ajn en la mondo.

El Ĉeĥoslovakio. — La 27-a de januaro signis gravan paŝon antaŭen en la reorganizo de Esperanto-agado en Ĉeĥoslovakio kun la celo plilarĝigi ĝian perspektivon kaj adapti ĝin al la nova politika strukturo de la lando. La ŝanĝo de unueca respubliko al federacio necesigis starigon de apartaj Esperanto-organizaĵoi agantaj sur la teritorioj ĉeĥa kaj slovaka. Tion proksimigis la oficiala aprobo kaj transdono la 27-an de januaro de la nova statuto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

El Bulgario. — La Estraro de la Ministerio por Komunikado de Bulgario cirkulere rekomendis al distriktaj direktoroj de komunikado kaj specialigitaj poŝt — kaj radio — entreprenoj helpi la instruadon de Esperanto. La cirkulero portas la subskribon de la ministro por komunikado Stojan Tončev. La rekomendo de la ministerio havas apartan signifon por la lernejoj, kiujn administras la poŝtaj kaj aliaj koncernaj instancoj.

Eldonoj. — Tre baldaŭ la literatura serio « Oriento-Okcidento » riĉiĝos per eldono de la sankta libro de la islamanoj « La Nobla Korano », kun paralelaj tekstoj araba kaj esperanta. La tradukinto estas Dro Chiussi. italo loĝanta en Frankfurto kaj erudicia orientalisto. La pli ol 600-paĝa volumo havos antaŭparolon de Sir Muhammad Zafrulla Khan, iama prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de U.N. Pro subcencio de islama movado, la prezo de tiu prestiĝa eldonaĵo estas malaltigita ĝis 20 guld. + sendkostoj.

— « Ellernu ! » progresa kurso de esperanto de Ferenc Szilagyi, 121 paĝoj kun amuzaj ilustraĵoj reaperis.

— « Parnasa Gvidlibro » de Kalocsay kaj Waringhien en plene reviziita eldono, kun kunlaboro de Roger Bernard estis reeldonita.

Mallongaj novaĵoj. — Detala adresaro de esperantistaj familioj kun denaskaj esperantistoj estas preparita. Skribu al : Sro S. Nemere, J. Olbrachta 3/5 m. 12, Torun, Pollando.

Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (STELO) pritraktos la ĉeftemon : « Studentaj utopioj, moviloj de monda progreso », en Graz, 15-22-a de Julio. Informoj : H. Kovacic, Grazbachgasse 57, Graz (Aŭstrio).

Aŭtunaj Feriaj kursoj de esperanto, en la altlernejo « Junaj Hejmoj » de Aarhus (Danlando), 12-18-a de oktobro. Adreso : Sro Friis, Ingemannsvej 9, 8230, Aabyhöj.

Se vi vojaĝas al Italujo en septembro : Itala Esperanto-Kongreso en Como, 13-18-a de septembro. Adreso : Esperanto-grupo Esperia, via Diaz 26, 22100 Como.

La konata esperantisto Prof. Egami, prezidanto de Japana Esperanto-Instituto, fariĝis la nova prezidanto de Japana Scienca Konsilantaro.

Esperanto-tago okazos en la kadro de la internacia komerca foiro de Lille, dimanĉon la 18-an de majo. Informoj : Norda Gazeto, 25, rue Gambetta, 62 Noyelles Godault.

La 7-a markola kongreso okazos en Bruĝo (Belgujo) la 3-an kaj 4-an de majo 1969.

ĈU VI KONAS TIĈINON

(Fino)

Ni ne restu eterne sur la mirindaj randoj de la lago, sed ni esploru ankaŭ la vilaĝojn de la apudaj valoj. Rapide ŝanĝiĝas la klimato kaj pli frapa aperas la kontrasto kiam oni forlasas trajne la kvazaŭ mediteranean regionon de Locarno kaj post kvaron-hora veturado ni troviĝas meze de pitoreske sovaĝaj valoj ! Ĉiuj tiuj valoj enpenetras proksimume 50 K-metrojn norden. La valo « Maggia », nomata laŭ la nomo de rivero alvenanta en la lagon apud Locarno, estas la plej sovaĝa kaj plurloke la fervojo kaj la aŭtoŝoseo havas nur tre mallarĝan breĉon je dispono por transiri inter nigraj krutaj rokmuroj. La rivero torente kaj gronde saltas de unu granita bloko sur alian kaj ŝajnas intenci, kiel eble plej rapide, porti siajn akvojn al pli varma loko. Tiu rivero estas tre ŝatata de la fiŝkaptantoj, kiuj estas certaj trovi belajn trutojn en tiu malvarma akvo.

Alia valo, malpli severa estas « Cento Valli » aŭ la cent valoj, tiel nomata ĉar fakte multaj valetoj (..eble ne cento..) de ambaŭ flanke alvenas al la ĉefa valo, kiun sekvas alia fervojo kaj aŭtoŝoseo. Tiu vojo estas pli grava ĉar ĝi ne estas **senelira** (kiel estas la valo Maggia) sed **transira** al Italio, al Domodossela kaj sekve al la fama Simplon Tunelo.

Mi devas mencii, ke tiuj fervojoj estas regionaj kaj ĝis nun ne apartenas al la tutnacia kompanio. Ili estas elektraj kompreneble, sed mallarĝaj. Vojaĝi en la « Cento Valli » estas la plej pitoreska ekskurso farebla ek de Locarno. La sinsekvo de plej variaj pejzaĝoj (tiom kiom da valoj) impresas neforgeseble La petolemo de la trajno, kiu konstante eniras kaj eliras el tuneletoj (foje nur 50 m. longaj) sed ĉiam laŭ kurba serpentema vojo : ni sekvas kaj ofte trapasas la ŝoseon, kiu same ludas kaŝ-kaŝe kun la tuneloj... Ofte oni vidas tre rimakindajn pontojn nomatajn « Romiaj ». Verŝajne ili datiĝas de la Romia epoko. Ili estas ŝtonaj, ofte nur larĝaj por sola piediranto. Tre alte, jen ogivforme, jen rondforme, ili per unu sola arko transiras profundajn abismojn, torentojn kaj kondukas al paŝtejoj. Ili estas tre bone konservitaj.

Ni altiĝas, la pejzaĝo ŝanĝiĝas. Iam ni preterpasis la lastajn ĝardenojn kun palmoj kaj mimozoj. Estas ankoraŭ vitejoj kun granitaj fostoj kaj laŭboj. Sed baldaŭ estas nur kaŝtanarboj kaj abioj kaj la trajna vojaĝo daŭras kvazaŭ en parko. Ni ĉirkaŭiras izolitajn domojn, ni preskaŭ tuŝas la kaŝtanbrancojn, kaj ni ŝatus ke tio pli longe daŭrus malgraŭ la fojfoje tre forta balanciĝado de la kurboriĉa vojo.

Alia valo sufiĉe grava laŭ longeco estas la « VERZASCA ». Tie ne estas fervojo. Ambaŭflanke de la rivero-torento « Verzasca » mallarĝa vojo kondukas supren al la deirpunkto de la valo. Estas nur 5 aŭ 6 vilaĝoj kaj la vivrimedoj estas tre limigataj. Ofte, la vojoj de ambaŭ flankoj suprenstaras abrupte, danĝere pli ol 200 metrojn super la fluejo de la torento. Ankaŭ ĉi-tie ĝis la altitudo de 700 metroj renkontiĝas precipe la kaŝtanarboj. Tiuj arboj multe mildigas la pejzaĝon kaj oni neniam bedaŭras la supreniran esploran vojaĝon. Estas alia speco de granito en tiu valo kaj la akvoj de la Verzasca ŝajnas verdaj pro la koloro de la rokoj sur kiuj ili kuras.

Tiuj tri valoj estas la ĉefaj de la regiono Locarno. Ili estas profundaj koridoroj kiuj ne povas facile komuniki unu kun la aliaj. Sur la supro de la 2.000 metra montaro oni trovas nur kapraj vojetoj. Pro tiu sendependa izoliteco, ĉiu valo evoluigis apartan okupon, vivmanieron kaj eĉ formon de dialekto !

Ekster tiuj etaj individuaj karakteroj en ĉiuj valoj de « Tiĉino » oni renkontas similajn trajtojn ĉe la vilaĝoj.

La granito estis ĉiam la materialo uzata por la konstruado de la domoj. En ĉiuj vilaĝoj la ŝoseo de la stratoj konsistas el duobla vico de larĝaj pavimaj blokoj,30 cm. per 40 centimetrojn larĝaj, je parelala distanco kiu respondas je la largeĉo de la veturiloj. Inter la vicoj de tavolaj pavimoj la ŝoseo konsistas ĝenerale el malgrandaj rulŝtonoj sur kiuj ne estas tre agrable marŝi.

La granda placo en Locarno konsistas preskaŭ komplete el tiuj rulŝtonoj, sed tie la piedirantoj ne suferas pro tiu malebena pavimado ĉar ili povas tute agrable promenadi sub arkaĵaro por trankvile rigardi la vitrinojn de la magazenoj.

En la vilaĝoj, la allogaĵoj estas aliaj ; oni ne grumblas kontraŭ densa aŭtomobila trafiko kaj sen urĝeco trapaŝas la stratojn. La ĉefa trajto de la strata strukturo en la Tiĉinaj vilaĝoj estas la senreguleco. Estas stratoj de plej diversaj larĝecoj kaj longecoj. La arkitekturo estas labirinta : anguloj, kurboj, stratetoj seneliraj aŭ kiuj subite pli larĝiĝas por formi placetojn, kovrita pasejo kiu kondukas al interna privata korto, aŭ ŝajne finita strateto, kiu post rektangula kurbo kondukas al nova vilaĝa horizonto, fontanoj sub arkaĵa anguldomo... jen la kutimaj surprizoj fare de la Tiĉinaj vilaĝoj. La muroj de la domoj estas tre dikaj, kaj ĉiam el ŝtono, ĉe la malnovaj ne mankas ankaŭ la tegmentoj kovritaj per granitaj platoj kiuj similus ardezojn, se ili ne estus tiel dikaj. Krome estas uzitaj tegoloj diverstipaj, inter aliaj la duonronda mediteranea tegolo. Kompreneble nuntempe oni konstruas multe kaj oni uzas modernan materialon sed oni daŭre uzas tegolojn, por konservi la stilon, oni ankaŭ faras arkadojn, eĉ se ili estas el nura cemento !

La dekoracia arbo de la vilaĝoj estas la platano, kiel en Provence. Ŝatataj rendevuejoj estas la « grotoj ». Tiuj estas gastetoj situantaj iom ektser aŭ ĉe la rando de la vilaĝo, en tre ombrata loko sub kaŝtanarboj aŭ platanoj. Tie la temperaturo estas ĉiam freŝa eĉ preskaŭ malvarmeta, plej ofte la tabloj estas instalitaj sub la arbaj laŭboj. Bedaŭrinde oni trinkas tie pli da vino ol lakto-kafo.

Nenia Tiĉina villaĝo troviĝas je vere montara altitudo kie la klimato estus pli severa. Ĉi-tie la alta monto estas ja ne tre akceptebla ĉar ne troviĝas altebenaĵoj. Dum montara promenado neniam prezentiĝas ripoziga loko. La vojetoj, kiujn povas elekti nur piedirantoj kaj kapreoloj, kondukas al ĉiam tre allogaj kaj pitoreskaj situoj sed oni vane serĉas komfortan anguleton por sidi, ĉe la montara regiono la vivrimedoj estas tre limigataj.

La Tiĉina popolo estas tre vivoplena, tre ŝatas la socian vivon, la sunon, kiu orumas la vilaĝojn en la mildaj valoj. Pli severaj lokoj ne taŭgus al gia temperamento. Ek de la suda flanko de la Gotardo-Tunelo ĝis

la baseno de la lago Maggiore aŭ Verbano kun la ĉefaj valoj norde de Locarno, ni esploris la pli grandan parton de la kantono Tiĉino. Tio estas nomata Sopraceneri (super norde de la malalta pasejo Monte Ceneri, 550 M.).

Estus granda manko ne koni la sudan pinton de la regiono. Tio estas nomata : Sottoceneri (sub = sude) de Ceneri pasejo. Belega larĝa stratvojo kondukas al tiu regiono preter la Monto Ceneri kie staras la turoj de la radio-elsendilo de la stacio de Lugano, kies programoj okazas en la Italia lingvo, loka nacia lingvo. La suprenirado al la pasejo ne estas malfacila : nura miniatura grimpado, se oni ĝin komparas kun la vojo al la Gotarda supro. Estas ja la fino de la Alpoj aŭ, por tiuj kiuj alvenas el la sudo, de la antaŭ-Alpoj



Post la pasejo, la vojo malleviĝas milde, regule, ĝis la urbo Lugano, la plej grava urbo de la tuta kantono. Fakte, ĝi estas pli granda ol la ĉefurbo Bellinzona, kaj vere impresas per imponaj magazenoj kaj urbaj trafikrimedoj. La ĝenerala aspekto de la panoramo estas ankaŭ mirinda. La lago de Lugano, nomata ankaŭ Ceresio, estas kompreneble la granda allogaĵo de la regiono ; ĝia altitudo estas 270 metroj super la marnivelo, do pli alta ol la lago Maggiore, kaj ĝi konsistas el pluraj branĉoj, kiuj iom stelforme penetras en diversdirektajn valojn. Ĉiuj ĝiaj branĉoj trairas la proksiman italan landlimon. Ili neniam estas pli ol 2 km. larĝaj, pro tio la kontraŭa flanko aperas distingeble, tre proksime, kaj oni sentas pli hejmecan etoson ol ĉe la majeste grandaj horizontoj de la lago Maggiore.

Tute apud la urbo Lugano, sur la orienta branĉo de la lago troviĝas du ĉarmaj vilaĝoj : Castagnola kaj Gandria. Vilaoj kun etaĝaj ĝardenoj, parkoj kun mediteranea vegetaĵaro faras de tiu angulo admirindan juvelon.

Ĉe unu el la sudaj branĉoj troviĝas la vilaĝo Morcote, fame konata de la pentristoj, kiuj de ĉiam ne laciĝas registri la pitoreskajn siluetojn de ĝiaj arkadaj domoj ĉe la lago-bordo, kun la fieraj altaj piramidaj cipresoj, kiuj gardostaras la suprajn ĝardenojn de la vilaĝo. Ankaŭ nun tre multaj estas la barkoj de la fiŝistoj sur la kvieta lago.

En Melide, tre mallarĝa terkolo ebligas al la fervojo kaj al la stratvojo la trairon de la lago. Tiucele, antaŭ unu jarcento estis konstruita ponto malalta por kunligi la du flankojn de la terkolo, inter kiuj estas libera spaco por la akvoj. Pro la malalteco de tiu ponto la pasaĝeraj ŝipoj de la lago Lugano estas platformaj kaj tute ne similas siajn kolegojn de la lago Maggiore. La grandaj Eŭropaj ekspresoj samrapide trairas la ponton-terkolon, kiu estas 1 km. longa, kaj daŭrigas sian kuradon al la landlimo !

Baldaŭ finiĝos nia Tiĉina esplor-vojaĝo. La lastaj montetoj pli kaj pli malaltiĝas, ni trairas la vilaĝon Mendrisio, kies cipresoj dissemitaj en la kamparo donas lastan noton de suda pejzaĝo, kiu iomete memorigas pri Toskanio. Jen, jam, la urbeto Chiasso kun denove doganistoj. Ni miras pensante ke post nur 50 km. nia trajno alvenos en la centron de Milano, meze de la ofte melankolia Lombardio.

Eble tro rapide ni kune vizitis tiun interesan pecon de la Svisa teritorio. Estus ankoraŭ multaj detaloj kiujn oni povus klare kapti nur dum longa, konstanta restado en la lando. Sed tiu sunigita tero, kies popolo estas plej kore akceptema, vekas facile la deziron pri vizito kaj scias nostalgie konkeri la fremdulojn kiuj baldaŭ sentos sin hejme.

Tiu granda Svisa kantono kun siaj 270 komunumoj kaj loĝantaro kiu atingas 300.000 personojn proksimume, longtempe estis unu el la plej malriĉaj en la tuta federacio. Fine de la pasinta jarcento, multaj Tiĉinanoj elmigris al Ameriko same kiel la Italoj, sed nun estas prospero ! Neniu elmigras, kontraŭe alvenas eksterlandanoj por labori. La moderna turismo rapide evoluis en regiono tiel riĉa je naturaj belaĵoj kaj favorata de unika klimato.

Politike la Kantono eniris oficiale la Svisan Federacion en la jaro 1803.

La Tiĉinanoj sentas sin antaŭ ĉio bonaj civitanoj de la Svisa naciaro, kiel la aliaj partoj de tiu firme unuiĝinta familio. Sed ankaŭ konserviĝas la tradicioj kaj la lingva aparteno kunligas ilin al la suda najbara lando.

Bela Tiĉino, ĝis revido !

Pierre METIVIER.

LA « KANTO DE L'MONDO »

de Jean LURÇAT

La « Kanto de l'Mondo » konsistanta el dek paneloj, entute 80 metrojn longaj, 4,5 metrojn larĝaj, estis akiritaj de la Angers-urbestraro, kaj nun prezentataj en la « Ĉambrego de la Malsanuloj » de la Malnova Hospitalo Sankta Johano (12a jarcento) en Angers.

Jean Lurçat entreprenis la « Kanto de l'Mondo » dum 1957. Lia morto, en 1966, devige, ĉesigis la komponadon de tiu ampleksa lan-fresko.

Pri la ekzistanta verko, jen la komentarioj diktitaj de Jean Lurçat mem, en 1964, por ekspozicio de la « Kanto de l'Mondo », en Pariza Muzeo de Dekoraciaj Artoj.

I. — « LA GRANDA MINACO »

... Kaj jen la momento, kiam, por ni maljunuloj, kaj ankaŭ por kiuj postvenas aŭ postvenos, hontinda minaco balanciĝas super niaj kapoj : la atom-teruregо. Kaj tio mem eksplikas kaj pravigas la titolon de mia unua tapeto : « La Granda Minaco ».

« La Granda Minaco » eksplikas kaj pravigas tiun aglon kun elrevigita rigardo, kiu ŝvebas super la mondo, kaj tiun bubalon kiu disĵetas venenon sur ĉiujn estajojn kreitajn aŭ generotajn. Ja, nia mondo vivas sur vulkano. Ĝi estas tie, kiu kraĉas siajn sulfurojn : vaporojn jam !

Tero estas io ronda, hirta ; estas io fluida kaj solida ; precipe estas homaj estaĵoj de ĉiuj mezuroj, ĉiuj kalibroj, ĉiuj koloroj. Kaj ĉio, ĝermoj, estaĵoj, vegetaloj, mineraloj, ventoj kiuj estas kvazaŭ terspirado, ĉio entute estas solidara.


Se la bombo estos liberlasita, ĉu de la aglo, ĉu de la sovaĝbesto, la tuta kreitaro iĝos nur venenigita magmo. Ĉio ! Kaj Nov-Jorko, kaj Pekino, kaj Kairo, kaj Parizo ; kaj Moskvo aŭ Marakeĉo, kaj Kiamar, kaj Lido, ĉio ne plu estos. Restos nur — tion cetere oni antaŭanoncas al ni — nur sennoma kaĉo el stonaĵoj, hurladoj, kaj konfuzegitaj homoj samaj al tiuj de Nagasaki kaj de Hiroshima.

Dekstre de tiu tapeto, flosas sur rara ondo la ŝipo de la kreitaro. La homo estas ĉe la stirilo, li gvidas, li homo, ĉar de nun li estas estro de la kreitaro. Jes, estro de la kreitaro, ĉar li povas ĝin detrui, ĝin infekti.

Estas do — mi tion ripetas — la homo, kiu de nun tenas la direktilon, sed super li estas la uro, la minaco, la monstro, kiu, bruto, spermeljetas sur la kreitaron.

Pro tio, ĉiuj bestoj, ĉiuj plantoj kiuj estas en la velŝipo jam estas trafitaj, eĉ kelkfoje lepraj, ekvunditaj.

En la ĉielo, la unuaj eksplodoj strias la fonon ; sed ne ankoraŭ ĉio estas perdita ! Super la homo alte staras, apud la direktilo, la strigo de Palasa Atena, la Saĝeco, kiu zorge gardas kontraŭ ĉio.



Kaj kredeble, estos evitigita al la homo,, al la homo, kiu estis nomita « Homo Sapiens », la sortoj de mortinto cindrigita sur la grundo, aŭ, se saviĝinta el la faroj, de halucinulo, ĉiumaniere de estaĵo krude mistifikita de siaj estroj, siaj astrologoj, siaj alkemiistoj.

... Kaj, tamen, ni vere estos ektuŝintaj la katastrofon.

Okazis Hiroshima.

Okazis Nagasaki.

★

2. — « LA HOMO DE HIROSHIMA »

La homo de Hiroshima estis disŝirita, senhaŭtigita, kiel ĉasbesto, sentripigita de la bombo. Se revenos nova Hiroshima, ĉiuj dignoj niaj estos nur fantomoj, homelioj, friponaĵoj. Kaj, ĉar ĉirkaŭ tiu kadavro, la karnoj estas nur ŝirpecoj, ĉio, floroj, libroj, monumentoj, fierecoj de niaj civilizoj, ideologioj, Kruco, Falĉilo kaj Martelo, Vodu aŭ Racio, ĉio estos neniigita, ofende mokita.

★

3. — « LA INFERA RONDO »

La bibliotekoj de Aleksandrio estos flamigitaj sub ĉielo el plumbo kaj stultegeco. La mondo, kiun ni knedas tiel lante, tiel malfacile per niaj manoj, nia mondo estos ronĝita de tiu virkapro lepra kaj straba, kaj la rondo, kiu povus esti frata rondo, estos nur « Infera Rondo ». Kaj la « Homo Sapiens » ĝuste tiel, kiel malsaĝa alkemiisto.

★

4. — « SENFINA NENIIGO ».

Nun, en la spacego, flirtas nur blanka neĝo, sterila, enukleita, tigo frakasita, kaj cindroj ondiĝantaj laŭvole de granda abismo. Ha ! ni rajtos fieri pri ni, pri nia Neniesco ! Tro facile estus — kaj tio estus konfeso pri nia malkuraĝo — instaliĝi en teruro kaj neniiĝo : La mondo ne estas bakita el silentoj kaj panikoj.

★

5. — « GLORKRONITA HOMO EN PACO »

Li konsistas el bono kaj malbono, la homo, sed por kiu scias rigardi al li pere de senrustigita vidpovo, liaj radikoj estas duvalentaj : kotoj kaj lumoj. Jen ,gardantino lia, la Saĝeco, kaj ĉiu saĝeco estas valora kaj fekundeca nur kiam ĝi estas ardigita de la koreco. Kolumbo kaj strigo estas fratinoj, ilia destino estas komuna. Jen kial, flankita de siaj du protektaj bestoj, la homo, kun plektita hararo, estas farĉita per folioj kaj astroj, per fontoj kaj flamoj. Tiel, li staras sur fono de radiaj galaksioj. Ĉio estos supervenkita, spite al la sango, la fuĝoj, la elturniĝoj.

★

6. — « LA AKVO KAJ LA FAJRO »

La akvo kaj la fajro, tiuj evidentaj maloj. La homo vivas nur de evidentaj paradoksoj, nur de kontraŭdiroj, kiuj solviĝas. Akvo kaj Fajro. Jen, kiam regitaj de ni, la akvo, kiu sufokas kaj la flamo, kiu konsumas, prisemas la mondon, fekundigas, gravedigas ĝin. La tritiko displitiĝas sub la baraktado, kaj la tero fendetiĝas, malfermiĝas al la lumo ; la nubegoj, la virina karno, la foliaro de la kverkoj kaj de la vitejoj, eĉ la ŝtonoj ekaspektas kiel fajroj. La paro formiĝas kaj elspruĉas efikeco kaj idaroj.

7. — « ĈAMPAN-VINO »

Ĉampan-vino : Estas elŝprudaco. La vino estas nenio, estas nur perversa likvaĵo se la koro ne estas ĝia entenanto. Kaj jen, nun, la fino de la unua ciklo.

★

8. — « KONKERADO DE LA SPACEGO »

« Sputnik » aŭ « Observer ». La homo suprenleviĝas kaj suprenleviĝos ĉiun tagon pli, en, kaj tra la astra spacego : La granda silento, tiu teruregо de la vastaj spacoj plenplenaj de strangaj lumoj vagantaj kaj palpebrumantaj. Jen kiam, de nun, de homoj aspekte maikonkordemaj, sed jam kunligitaj per granda saĝeco, ties teruro, iun tagon venontan, ridetigos niajn posteulojn.

Ni estas nur ĉe la antaŭpreparoj, ni ankoraŭ estas nur esplorantoj de antaŭzonoj. De la ĉielo, ni tuŝas nur la randojn, sed, tamen, ni tuŝas ilin per la fingro. Ni tanĝis al la timego de la grandaj vakuoj, sed el tie ni revenis : Viglaj, kaj pretaj je rekomenco.

Do, la ĝojo estu havaĵo je la atingopovo de la homo ; la angoro restu sed la fido estu armilo firme tenata de niaj premantaj fingroj.

★

9. — « POEZIO »

En « Poezio », la poeto estas tie ĉeestanta, reganta, ĉirkaŭata de radioj. Li mem fajro, generanto, pafarkisto provanta trafi la koron de la aĵoj, la centron de la cirklo. Oni rimarkigis al mi, ke Rainer Marie Rilke naskiĝis sub la signo de la Sagitario. Estas koincido, ĉar, eĉ antaŭ konatiĝi kun Rike sur la montetoj de « Sceaux », kaj la ĝardenoj de « Byron », en nia cerbo, la pafarkisto ĉiam estis ligita al la poeto, al tiu, kiu trafe pafcelas. Eble, por iuj, la Sagitario estas arbaro plenplena de facilaĵoj, de bagatelaj trompoj, de simbolaj lamaĵoj. Sed, la homo kiu scias, vidas, kredas, kaj ŝatas scii, retrovas en tiuj strangaj emblemoj, la akvon, la teron, la vaporojn. la mineralojn. Tiuj kvar anguloj supernoblaj aŭ senceremoniaj en kiuj enkrustiĝas la fidoj, la esperoj, la semoj kaj la gestoj de la homo, kiu kantas frunte al la suno, rigardanta rekten al la luno.

★

10. — « ORNEMENTOS SAGRADOS ».

Tiu deka tapeto, « Ornementos Sagrados » aŭ « Konsekritaj Ornamaĵoj », falis el la teks-maŝinoj plurajn monatojn post la morto de Jean Lurçat. Sendube, ĝi restos la plej mistera el tiuj dek tapetoj, ĉar J. Lurcat donis pri ĝi nur malmultajn klarigojn al siaj proksimuloj.

Vizitinte malnovan monahejon en Meksikio, li restis rememoranta pri tiu titolo. « Ornementos Sagrados », legita en ekspozicio-ĉambro pri konsekritaj ornamaĵoj.

Povas esti, ke J. Lurçat deziris laŭdi kelkajn el la mond-elementoj — mineralaj astroj, vegetaloj, proponitaj al la okulo de la homo, centro de la terglobo, kiel tiom da konsekritaj ornamaĵoj de la kreado.

La necerteco, en kiu ni estas, donas al ni plian motivon por serĉi en tiu art-tapeto, kiel en la aliaj, ne nur ariĝon de simboloj, sed precipe por esti sentemaj, kiel deziris Lurçat, al la lingvo de la formoj, de la ritmoj, de la koloroj.

Trad. de B. CHEVERRY.

La Cikonio (II)

Tiu nesto, kiu servas kiel balkono, prapatre okupita, riparita, kompletigita, plialtigita laŭ la deziro de ĉiuj sinsekvaj loĝantoj kelkfoje atingas imponajn dimensiojn, ekz : tiuj veraj monumentoj larĝaj je 3 metroj, altaj je 2, 50 metroj ; kelkaj estas ŝarĝitaj je historio : tiu de Thuringe, ankoraŭ nun okupita pri kiu parolas dokumentoj de la XV-a jarcento.

Longe daŭras la konstruado de la nesto : Nepre necesas foresti kiel eble plej malofte. Senskrupulaj novalvenantoj kelkfoje vagas serĉe al jam tute ekipita nesto. Sturmoj, severaj sieĝoj, bataloj je flugilbatoj kaj bekbatoj celas frakasi kraniojn aŭ fari truojn en la ventroj. En aprilo 1964, en Roeschwog, apud Strasbourg, terura aera batalo celis konkeri neston. Rezulto : unu morto, kelkaj vunditoj ; despli bedaŭrinde, ke estis sufiĉe da loko por ĉiuj.

En Nederlando kaj Alzaco homoj helpas : ĉe ekstremaĵo de fosto ili starigas pretkonstruitajn nestojn sur ĉarrado.

Kiam finfine en sia nesto, superforte defendita aŭ konkerita, S-ro Cikonio, atendanta sian Belulinon siluetiĝas sur la ĉielo, staranta sur siaj arde-ruĝaj kruroj, la belega birdo, alta proksimume je 1,30 metro, blanka kiel neĝo, de tempo al tempo disvolvas siajn senmakulajn flugilojn, nigre borderitajn : enverguro : 2 metrojn.

Tute supre, baldaŭ pasas la inaj flugadoj, miksante spertajn matronojn kun amdeziraj virgulinoj. LI, kun sia longa vermiljona beko, celdirektita al la ĉielo brue hevokas ilin... laŭ propra maniero ; fakte cikonio estas muta, tial pro manko de siblopovo ĝi klakas per la beko.

Kiam subite alvenas la titola edzino, ŝi eliĝas el la grupo kaj elegante spiralplonĝas al la nesto, kiu ŝin atendas.

Ĉu la masklo estas vidvo aŭ fraŭlo ? Solulinoj sin proponas. Oni konatiĝas aŭ re-konatiĝas. Kelkfoje tute malserene per bek-kaj-flugilbatoj. Tamen, kiam oni estas certaj pri siaj reciprokaj sentoj oni ek-geedziĝas. Oni multe troigis la edzecan fidelemon de la cikonio ; fakte, tri-jara fideleco estas maksimumo. Tamen, kvankam plej ofte de unu jaro al la alia ŝanĝiĝas la parulo, dum la tuta jaro la elektito ricevas absolutan fidelecon (ĝis heroismo).

En sia komuna vivo, tuj de la komenco, la paruloj, tre striktaj pri la etiketo, reciprokas al si « bonajn manierojn ». Je ĉiu reveno al la hejmo oni, klakante per la beko, salutas unu la alian, laŭ preciza kodo : stilkonformaj riverencoj sekvataj de rapida kapmovo malantaŭen ; sed atentu : ritoj malbone observataj povas okazigi « tanadon » kaj eĉ mortkondamnon. Sed reciproke al si klaki per la beko sub la nazo estas nur kvazaŭ preludoj. De eterne la vera celo estas fiksita : ĉiamagi la cikoni-genton kaj ĵeti en la ĉirkaŭon idojn kapablajn fronti aŭtunajn migradojn. Nepre urĝas : Sino Cikonio apenaŭ hejmeniĝis, kiam S-ro Cikonio prezentas al ŝi siajn omaĝojn. Dum la sekvantaj tagoj varme S-ro Cikonio omaĝas al S-ino C., tiel ke unu semajnon post la nupto la edzino jam patriniĝas : ĉiun duan tagon ŝi ovodemetas unu malbrilan ovon proksimume 8 cm x 5 cm granda, en-tute 3 -4 -5 ovojn, nepre kovendajn. Laŭ saĝa partigo de la laboro, ĉiu el la gepatroj laŭvice kaŭriĝas sur la ovoj. Neniam oni forlasas neston kaj ovojn. Dum la tago, per la beko, la patrino ilin turnas, por ke ili ricevu regulan temperaturon ; oni devas ofte aerumi la litaĵon, kiu fermentas kaj varmumiĝas, elĵeti el la nesto putrintajn materialojn kaj ilin anstataŭigi per aliaj. Kia zorgado ! Tio, dum proksimume 40 tagoj, ĉe fino de kiuj, laŭ vico de la kovadoj, la etuloj estos rompiĝintaj sian ŝelon kaj malfermiĝintaj sur la pejzaĝo siajn mirigitajn okulojn. Jen por ili dumonata et-infanaĝo pasigenda en la nesto, sub gepatra protektado kontraŭ aliaj cikonioj serĉantaj malmultekostan manĝon. Precipe varmon bezonas la beboj, tial, laŭ la vetero la gepatroj iĝas ĉu sunombreloj, ĉu pluvombreloj. La nutrado de la junuloj ŝanĝas laŭ ilia gorĝo : rilate la sucbotel-tempo oni elektas majskarabojn (melolontojn) ; kiam venas la kaĉotempo oni preferas ranetojn, musetojn kaj finfine jen ranoj, ronĝuloj, serpentoj ,tute skuiĝantaj, kiujn la gepatroj alportas en sia beko. Male al plejmulto de aliaj birdoj, la cikonio ne enigas la nutraĵon ĝis fundo de la faŭkantaj bekoj sed ĝi metas ĝin sur la randon de la nesto : kompreneble la idoj samtempe levas la kapon sed temas nur pri laŭetiketa saluto instruita jam de la eloviĝado.

Povas okazi, en tiu nest-periodo, ke la patrino cedas al bedaŭrindaj infanmurdoj. Longtempe oni opiniis, ke tiamaniere ŝi solvis la nutro-malfacilaĵojn. Fakte ŝajnas, ke temas pri alia problemo : laŭ la kovadoj, la lasta naskiĝinto, eloviĝinta 10-12 tagojn, post la unuaj estas multe pli malforta ol la aliaj : la unuenaskiĝintaj alproprigas al si la nutraĵon kaj la lasta pli kaj pli malfortiĝas; kiam ĝia malbona fizikstato evidentiĝas la patrino ĝin ekstermas. Eĉ, oferante al ia Moleĥ, normalajn idojn la patrino murdas — kelkfoje ĉiujn krom unu (el 3-4 infanoj) Bedaŭrinde, ĉar la cikoniogento pli kaj pli maldensiĝas. 50-taga infanaĝo jam pasis. La junuloj, kiuj postvivis ĉiujn kreskado-malfacilaĵojn sentas jukojn en siaj flugiloj. Verdire, jam de la 3-a semajno ili provas kelkajn ŝvebadojn, 10-cm super la nesto. Nun starantaj sur la parapeto, ili, klakante per la beko, tiretendas malpaciencajn plumojn. Ankoraŭ 10 tagoj kaj ili ne plus povas rezisti ; kuraĝigataj de la gepatroj kiuj ĉirkaŭ la nesto, multobligas la flugo-demonstrojn, ili sin ĵetas en la aventuron ! Kia ebrieco ! Tio daŭras proksimume 15 tagojn kaj subite ili malaperas en la horizonton ! Ek al la aŭtuna migrado ! Iliaj gepatroj ne plu ilin revidos : la etuloj fariĝis grandaj ! kiel diras la kanzono « Ne plus estas infanoj ! »: Sendube la gepatraj forlasitoj zorge instruis al ili la sekvendan vojplanon, ĉar la forflugintoj ĝuste envojiĝis.

Ja ! « vojaĝoj formas la gejunulojn ! » Ĉi — kaze ili havos sufiĉe da tempo por formiĝi : tiu vojaĝo al nekonato : 9 000-10 000 kilometrojn longa daŭros 2-3 monatojn kaj devigos la migrantojn adaptiĝi al nova sezono en nova hemisfero.


S. G.

Pri la lando de la 57-a U.K.

Aspektoj de Usono



Tio estas ĝenerala vidaĵo de Washington D.C., ĉefurbo de Usono, kies originalaj planoj estis faritaj en la 18-a jarcento de la franco L'Enfant. Tie estas vizitindaj ne nur la Kapitolo kaj la Blanka Domo sed ankaŭ la Smithsonian muzeo riĉa je kolekto de pentraĵoj, raraj poŝtmarkoj, malnovaj lokomotivoj kaj bal-roboj de la usonaj Prezidentoj. Oni vizitu Washington dum la printempo, kiam la ĉerizarboj floras. Vespere, la urbo estas unika vidaĵo, kiam oni staras ĉe la supro de la Washington-monumento.



Tio estas bildo de la XVIII-a jarcenta Usono. La Raleigh-taverno en Williamsburg, ŝtato Virginio. Tie dancis Jefferson, manĝis Washington, rendevuis la revoluciuloj. La ŝtato Virginio estis la naskiĝloko de Usono ĉar tie albordiĝis la unuaj anglaj pilgrimantoi. Ankaŭ tie kapitulaciis la Angloj venkitaj de la usona kaj franca armeoi. Williamsburg estis antaŭposteno komence. Ĝi fariĝis ĉefurbo de Virginio en la 17-a jarcento. Ĝi nun estas muzeo de la unuaj jaroj de koloniado.

IOM DA SCIENCO

Brul-piloj (1)

Nune oni multe parolas pri **brul-piloj.** Fakte, ili povas, kiel elektro-generatoro malmulte peza, esti diversmaniere uzataj. En astronaŭtiko, ili havigas, al la spacaj kajutoj, akvon kaj elektran kurenton. Antaŭ kelkaj jaroj, la malbona funkciado de tiuj piloj okazigis gravajn zorgojn pri la sorto de loĝota satelito

Aliflanke, kaj tio interesas nin ĉiujn, tiuj piloj montriĝas estontecaj generatoroj por la elektra antaŭenpuŝado de niaj aŭtomobilaj veturiloj. Tiu puŝ maniero havas, super niaj nuntempaj eksplod-motoroj, bone konatajn avantaĝojn : ĝi estas senbrua, senodora, kaj ne polucias la aeron en niaj urboj.

Kompreneble oni povus ekipi niajn veturilojn per elektra motoro nutrita de akumulatoroj. Sed tiu solvo ne estas uzebla pro la tro granda pezo de la nuntempaj baterioj.

EKZ : 6-elementa baterio konsistanta el plumbo-akumulatoroj povas liveri nur 1/6 da ĉeval-povo dum 6 horoj.

Aliflanke la plej modesta benzin-motoro havas potencon de 20 ĉeval-povo ; anstataŭ tiu benzin-motoro la veturilo devus esti ekipita per 120 el tiuj pezaj baterioj : kompreneble ĝi povus transporti nur la akumulatorojn, ne la vojaĝantojn !

Kvankam ekzistas akumulatoroj malpli pezaj ol tiuj, kiujn ni konas, la plibonigo — rilate la pezon — estas tiel malgranda, ke la problemo restas la sama. Plue — eĉ survoje — oni devus ne forgesi reŝargi la bateriojn.

Tiu problemo ŝajnas solvita helpe de tiuj brul-piloj, jam realigitaj sur eksperimanta tereno. Tia 3 kilograma pilo, nutrita je oksigeno kaj hidrogeno povas liveri 1 ĉeval-povon.

Ĉar la elektra motoro ne tro pezas, la tuto (motoro + piloj) pezos ne multe pli ol sampotenca eksplod-motoro.

Tamen, por ne vigligi tro truajn entuziasmojn, ni ripetu, ke ili estas nur eksperimentaj piloj, ne komercigitaj, nutritaj per gasoj ; tio estas nek estetika, nek praktika.

KIO ESTAS BRUL-PILO (O_2 H_2)

O_2 = oksigeno H_2 = hidrogeno

Kvankam la funkciado de tiuj piloj povas ŝajni, por kelkaj, malfacile komprenebla, la principo estas simpla.

Ĉiuj aŭdis pri elektrolizo de la akvo. Ni memoru : oni metas potaso-solvaĵon en voltametron, kiun oni konektas al la 2 polusoj de elektro-generatoro (**EKZ** : akumulatoroj-baterio 6 -volta). Kiam la kurento pasas, oni vidas, ke gasoj produktiĝas sur la elektrodoj : hidrogeno troviĝas ĉe polusa elektrodo (—) kaj oksigeno ĉe polusa elektrodo (+).

Ĉio okazas kvazaŭ akvo estus dispartigita en siajn 2 konstituantojn : 0_2 kaj 2 H_2.

La generatoro liveris sub formo de elektra kurento cirkulanta en la cirkvito la energion necesan por tiu dispartigo.

Brul-pilo realigas la inversan fenomenon. Oni havigas al ĝi 0_2 kaj H_2 : la du gasoj kombiniĝas unu kun la alia por formi akvon kaj sekve la pilo donas elektran energion : tiu elektra kurento estas same uzebla, kiel tiu de akumulatoro.

Pere de tiuj du gasoj oni povas fari motorojn, aŭ prefere reaktorojn : tiuj reaktoroj funkciigas la pliparton de la spacaj fuze-rakedoj (**EKZ :** en Saturno V). Ili estas brul-motoroj : H_2 brulante kun O_2 produktas grandan kvanton da varmo : la gasoj rezultantaj de la brulo (akvo-vaporo kaj aliaj gasoj) portitaj ĝis alta tempera-






Fig. 1








Fig. 2

turo okupas egan volumon kaj eskapas el la duzoj kun granda rapideco.

Okaze de lanĉado de fuze-rakedoj, televido kutimigis nin al tiu speco de motoroj.

En tiuj flugmaŝinoj la energio liberigita de la kombino O_2 + 2 H_2 manifestiĝas sub varmeca formo. Brulpilo efektivigas la saman kombinon O_2 + 2 H_2 sed la energio aperas sub formo de elektro energio multe pli manipulebla. Estas nek flamo, nek eksplod-danĝero, nek brulvundo-risko ; sed estas elektra kurento facile uzebla.

PRINCIPO DE LA FUNKCIADO

Ĉi tie ni volas ekspliki kiamaniere oni povas realigi tiun kombinon : O_2 + 2 H_2 : Jen du teoriaj skemoj, kiujn ni poste ambaŭ apudmetos por konstitui la pilon (H_2, O_2).

I-a SKEMO : Elektrodo O_2

Ni konsideru la jenan kemian ekvacion (A)

O_2 + 2 H_2 O + 4 e- = 4 (OH)-

O_2 = oksigeno-molekulo.

H_2 O = akvo-molekulo.

e- = elektrono portanta elementan ŝargon da negativa elektro (signo -).

(OH)- = parteto nomita « jono » ŝargita (same kiel la elektrono e-) de negativa elementa ŝargo.

Tiu jono ekzistas en akvo ĉar kvanto — verdire sufiĉe malgranda — da molekuloj (H_2 O) estas dispartigita en hidrogen-jonojn (H^+) kaj en jonojn (OH)- laŭ : H_2 O = H^+ + (OH)-.

Oni vidas, ke en tiuj 2 kemiaj reakcioj estas (ambaŭflanke de la signo =) sama kvanto da atomoj de ĉiu speco, kaj sama kvanto da elektraj ŝargoj.

Ja, ekvacio (A) povas ŝajni arbitra : kutime O_2 ne reakcias kun H_2 O kaj kiamaniere enigi la 4 elektronojn entenatajn en la unuan membron de tiu ekvacio ?

Pli poste ni vidos, ke tiu ekvacio vere efektiviĝas. Provizore ni reprezentas tiun ekvacion per la sekvanta skemo (fig. 1).

La elektrodon figuras la haĉita rektangulo. Estas interne, ke okazos la reakcio.

La sagetoj — direkte al la elektrodo — respondas al la korpoj aŭ al la partetoj skribitaj en la unua membro de la (A) — ekvacio. La sageto 4 (OH)-, kiu eliras el tiu elektrodo reprezentas la rezulton de la reakcio kaj direktiĝas al akvo, ĉar nur ĉi tie povas ekzisti la jonoj (OH)- (fig. 2).

2-a SKEMO : Elektrodo H_2

La fundamenta ekvacio estas nun :

4 (OH)- + 2 H_2 = 4 H_2 O + 4 e-

La skemo responda al tiu evkacio estas — kun samaj konvencioj por la eniroj kaj la eliroj — la figuro 3

3-a skemo : brul-pilo O_2, H_2

Sur unusola skemo ni kunigu la 2 antaŭajn elektrodojn (fig. 2 + fig. 3). Meze, inter la elektrodoj, oni metas akvon : por ekhavi la atenditan pilon, oni kunligas la 2 elektrodojn per konduktanc-drato, kiu permesas la jenan rezulton :

La elektronoj dekstra-flanke liberigitaj anstataŭas la elektronojn maldekstra-flanke absorbitajn (fig. 4).

Tiu konduktancilo estas trairata de elektra kurento, kiu daŭras tiom longe, kiom estas provizitaj (O_2) — gaso en la maldekstra fako, kaj H_2 — gaso en la dekstra fako. La kurento fermiĝas pro transporto de la 4 jonoj (OH)- maldekstre liberigitaj kaj dekstre absorbitaj.

Pri la kemiaj specoj ni konstatu : por unu molekulo O_2 kaj 2 molekuloj H_2, produktiĝas dekstre 4 (H_2 O) kontraŭ 2 (H_2 O) maldekstre absorbitaj.

Konkludo : produkto de 2 (H_2 O) ; ĉi tio estas tute konforma kun la konata reakcio :

O_2 + 2 H_2 = 2 (H_2 O)

Sed la produktata energio montriĝas ĉi tie, ekstere de la pilo, sub formo de elektra kurento, kiun oni povos uzi por funkciigi motoron, ŝalti lampojn, k.t.p.

Ni notu : la transporto de la negativaj ŝargoj (e- aŭ (OH)-) ĉiam okazas laŭ la sama direkto (inversa al la rotacio-senco de la horloĝmontriloj).

Ekstere de la pilo la elektronoj iras de H_2 — elektrodo al O_2 —— elektrodo ; O_2 — elektrodo estas la pozitiva poluso : la alia (H_2) estas la negativa poluso.

Tiu malnova kutimo — jam de la 19-a jarcento — igas diri, ke la kurento (kiun oni supozis transporti **pozitivajn** ŝargojn) translokiĝas de la + al la — ekstere de la generatoro. Tio povas aplikiĝi ĉi tie.

(daŭrigota).

R. JACQUESSON.

FANTAZIAĴO

KAZIMIRO-Jenö Heltai

Somerkomence mi partoprenis abiturientan renkonton. Ni kunvenis dudekope, kiuj iam, antaŭ dudek jaroj abiturientiĝis. Al kelkaj el ni ne multe utilis la abiturienteco, sed tamen ni sukcesis en la vivo. Ĝenerale el inter ni preskaŭ ĉiu restis malriĉa, sed tio ja ne malhelpis, ke ni finu la renkonton per ĉampana vespermanĝo.

La vespermanĝo estis gaja kaj laŭta. Ĉiuj paroli samtempe,, ĉiuj samtempe recitis el la estinto la memorojn de la studentoŝercoj jam longe forgesitajn. Kaj denove ni varmiĝis unu al la alia, ni, kiuj dum dudek jaroj apenaŭ vidis unu la alian kaj sciis nenion pri unu kaj la alia. Komenciĝis la demandado : Kion vi faras ? Ĉu vi jam havas edzinon ? Familion ? ktp., ktp., kiel ĉi-okaze estas kutime. Ĉiu skizis mallonge la historion de la pasintaj dudek jaroj, nur Kazimiro estis revema kaj silenta. Kiam ni komencis lin esplordemandi, li nur lakone respondis :

— Dankon, mi estas privatulo en Vieno.

Kazimiro estis stranga knabo jam en la gimnazio. Li estis modesta, bonkonduta, silentema, eminenta lernanto, kiun la profesoroj tre amis kaj ni tre enviis. Ankaŭ nun ni alrigardis lin kun estimo ; jen — tion ni jam estus provintaj scii en la lernejo, — ke inter ni Kazimrio estas la sola, kiu faris karieron kaj privatas en Vieno.

Kiam post noktomezo ni disiĝis, por denove renkontiĝi post dudek jaroj, Kazimiro aliĝis al mi kaj diris modeste :

— Mi akompanos vin, se vi permesas.

— Mi tre ĝojas.

— Des pli, ĉar vi estas la sola, kiun mi konfidas kaj al kiu... al kiu... mi kuraĝas konfesi...

Li eksilentis. Mire mi demandis :

— Kion vi volas konfesi ?

— Olda knabo, mi ne estas privatulo.

— Sed kio ?

— Poŝoŝtelisto. Internacia poŝoŝtelisto.

Mi algapis lin, poste mi ekridis :

— Vi ebriiĝis, Kazimiro. Vi trinkis multe da ĉampano. Vi ne scias, kion vi parolas.

— Mi tre bone scias. Mi diris la veron. Mi estas internacia poŝoŝtelisto, mi estas fripono, mi estas malhonesta, mi konas la internon de la malliberejoj. Do se nun vi volas, ne plu parolu kun mi, mi ne koleros, por tio mi ja ne havas rajton; sed vi, kiel honesta homo, havas la rajton alvoki policiston, kiu tre ĝojos, ĉar la policaroj de la Eŭropaj metropoloj jam depost monatoj serĉas min.

— Mi ne alvokos policiston, Kazimiro, — mi diris kun iom da emocio — eĉ mi plu parolos kun vi. Finfine hodiaŭ ni ja partoprenis renkonton de lernejkamaradoj, kaj ne tiun de honestaj homoj. Povas esti, ke la lastan renkonton vi ne rajtus partopreni, sed la unuan rajte vi partoprenis. Do mi havas neniun kaŭzon, por ĉesigi kun vi la konversacion.

— Dankon, — diris Kazimiro eĉ kun pli da emocio — tio estas bonvena. Vi ne scias, kiom sufe-ras miaspeca homo. Mem la riĉo ne donas feliĉon. Vane mi havas multe da profito, vane vivas bonege, vane mi traveturis la tutan mondon, tamen mankas al mi la plej grava afero...

— La honesto !

— Ne ! La memcerto !

Poste ni eniris kafejon kaj Kazimiro rakontis, kiel li fariĝis poŝoŝtelisto, kion li travivis dum la pasintaj dudek jaroj. Li rakontis belegajn, verajn historiojn. Bonege mi amuziĝis, mi eĉ ne hontas konfesi, ke depost multaj jaroj ĉi tiu vespero estis por mi la plej agrabla. Sed kiam ni disiĝis, mi estis konvinkita, ke mi tamen pravis : Kazimiro ebriiĝis kaj mensogis. Li nur eltrovis tiujn historiojn. Mi eĉ diris tion al li.

— Povas esti ! — li diris ridante.

Li ekiris en la nokto, sed subite li returnis sin :

— Hola !

Mi haltis. Ridante li venis al mi :

— Rigardu, oldulo, hazarde mi prenis vian oran horloĝon... kaj mi ne volas posedi ĝin... Bonvolu montri, kiu estas via horloĝo ?

Kaj li metis antaŭ min dudek unu orajn horloĝojn, kvankam la bankedon partoprenis nur dudek personoj. Sed inter la horloĝoj troviĝis ankaŭ tiu de la gastejisto.

El la hungara : Laszlo Somlai.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Kun tiuj ĉi du lastaj problemoj finiĝas nia konkurso 1968-69. Bonvolu sendi viajn solvojn antaŭ la fino de majo al : S-ro P. Chevalier, 19, boulevard Gabriel Lauriol, 44 - NANTES, Francujo.

UNUA PROBLEMO (20 poentoj)

Bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj en la ĉi-subaj frazoj. Estos kalkulitaj 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste elektita, sed estos forprenita 1 poento por ĉiu vorto netaŭga.

1) ..... bela estis tiu katino, ... mastro estis urbano.
2) ..... da urbanoj, hodiaŭ, en la vilaĝo !
3) Ni kutimas matenmanĝi ..... laŭ angla modo.
4) Mi dubas, ĉu li .....
5) Li aĉetis pecojn ..... riĉaj ŝtofoj.
6) Vi devis elekti ..... vorton pli simplan.
7) Kiu riĉiĝas, ... fieriĝas.
8) Li veturas ..... cent kilometroj hore.
9) Li komercas ..... sia propra konto.

DUA PROBLEMO (10 poentoj)
Vorto-ĉeno

Eltrovu la 17 vortojn, kiuj formas ĉenon tiel, ke ĉiu vorto komenciĝas per la meza silabo de la antaŭa vorto. La unua vorto komenciĝas per la meza silabo de la lasta vorto. Ĉiuj serĉotaj vortoj konsistas el tri duliteraj silaboj, do el ses literoj. La vortoj signifas :

1 — urbo en Svislando. 2 — Eleganta besto en Afriko. 3 — Agrabla venteto. 4 — Kriptogama kreskaĵo. 5 — Insekto imitanta flugmaŝinon. 6 — Juvelŝtono kun marakva koloro. 7 — Puriga vegetaĵo. 8 — Senhonte malrespektema. 9 — Rivero en Afriko. 10 — Sankta libro, parto de la biblio. 11 — Lando en Azio. 12 — Belflora kreskaĵo liveranta opion. 13 — Franca urbego. 14 — Malakcepti. 15 — Akva birdo. 16 — Fransdoni komercaĵon. 17 — Teksaĵo kun haretoj.

Pluaj demandoj : (nur uzotaj por dispartigi la ekvalgajnintojn).

1 — Kiom da personoj partoprenis la ĉijaran konkurson ?
2 — Al kiom da nacioj apartenas tiuj personoj ?

AMUZAJ PROBLEMOJ
Solvoj de la lastaperintaj problemoj

La farmistoj : La nombro da anasoj aĉetitaj de la edzino de Johano estis la duono de la nombro da porkoj aĉetitaj de Alberto, kaj la duoblo de la nombro da porkoj aĉetitaj de la edzo de Johanino. Do Alberto ne estis la edzo de Johanino. Johanino estis la edzino de Georgo aŭ Johano. Sed la edzino de Johano aĉetis anasojn kaj Johanino ne aĉetis anasojn.

Do Johanino estis la edzino de Georgo.

Konsekvence Alberto estis la edzo de Maria aŭ de Elizabeta. La nombro da anseroj aĉetitaj de la edzino de Alberto estis la duono de la nombro da anasoj aĉetitaj de la edzino de Johano, do la kvarono de la nombro da porkoj aĉetitaj de Alberto. Sed la nombro da anseroj aĉetitaj de Elizabeta estis la duoblo de la nombro da porkoj aĉetitaj de Alberto. Do Elizabeta ne estis la edzino de Alberto. La tri paroj estis : Johano kaj Elizabeta, Alberto kaj Maria, Georgo kaj Johanino.

En la fundo de la maro : la dek eraroj trovotaj estis : vertikala streko super la unua fiŝo, flanka streko sur la unua fiŝo, naĝileto sub la kapo de la unua fiŝo, veziko sur la maldekstra flanko de la bildo, flanka naĝilo de la dua fiŝo, fiŝeto sur la dekstra flanko de la bildo.

NOVA PROBLEMO

Kiam la aŭtomobiloj aperis en la lando Vlajlo, oni decidis ne uzi ciferojn sed literojn por registri ilin. Ĉiu posedanto de aŭtomobilo ricevos tri literojn, kiujn li ordigos laŭvole (ACT povos esti : CAT, TAC...). Sed ĉar la nombro da aŭtomobiloj kreskis, oni decidis poste atribui al ĉiu aŭtomobilisto kvar diversajn literojn ordigotajn laŭvole de la posedanto. Tiamaniere, estis eble kvinobligi la nombron da registritaj aŭtomobiloj.

Kiom da literoj la Vlajla alfabeto posedas ?

NE FORGESU

ke vi devas sendi vian reabonon aŭ abonon al via peranto aŭ al :

Pierre BABIN, 13, Bd de la Chauvinière
44 - NANTES, Francujo
pĉ Nantes 2 813 61


NE SENDU monon el eksterlando rekte al la supra adreso. Tio devigas nin al pliaj elspezoj. Sendu monon pere de la poŝtkonto. Dankon.

GRAMATIKO PER BONHUMORO


« La volitivo (u-modo) esprimas celon, deziron, konsilon, peton aŭ pli ĝenerale ideon pri ago nur konceptata, kies realigo plej ofte dependas de iu alia ol la konceptanto aŭ de io ekstera. »



— Li estas afabla knabo sed mi nun petos ke li sin razu pli regule.



— Por atingi feliĉon estas necese, ke vi modelu vian vivon laŭ la cirkonstancoj, aŭ ke vi adaptu vian ĉirkaŭantaron al via vivmodelo.



— Mi volas, ke vi konu ĉielan feliĉon.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (12 ŝil).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (1,50 us. dol.).

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk : Tu 60253 (7 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO 90 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (540 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zl.).

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).

Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1969, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

L'Assemblée Générale, dont vous pourrez lire le compte-rendu dans ce supplément, s'est tenue le 30 mars. Elle a constaté après étude du compte d'exploitation et du bilan que la M.C.E. continuait à suivre sa route, sans éclat peut-être, mais aussi sans difficultés. Car le bilan n'est qu'un constat qui ne reflète pas en détail le parcours accompli. Et ce parcours n'est jamais sans incidents. Les problèmes à régler sont nombreux au cours d'une année ; problèmes financiers (ce sont souvent les plus faciles à régler : reversement du « don », entretien, réparations inattendues, investissements prévus ou imprévus : forage d'un nouveau puits ; les problèmes de personnel qui changent d'aspect avec les individus mais qui existent toujours sous une forme ou sous une autre ; problèmes humains : indifférence, ou ce qui est plus pénible encore, incompréhension de certains camarades. A cela vient s'ajouter l'incertitude de l'avenir. L'équipe dirigeante est toujours là ; on se repose sur elle. Mais après ? La relève ne doit pas se faire brutalement sous la pression des circonstances. Elle doit s'assurer progressivement. L'apprentissage est long, car la M.C.E. est une chose originale et il faut qu'elle garde cette originalité donnée par Micard et que nous voulons lui conserver. Originale, elle l'est dans son esprit qui veut que chacun remplisse sa tâche avec pour seule récompense l'espoir d'avoir servi l'esperanto et les espérantistes. Cela suppose parfois des renoncements, des désillusions ; cela suppose toujours un cheminement obscur, émaillé de tracas, qui aboutit au plaisir de voir, en été, que le travail n'a pas été vain. Originale la M.C.E. l'est aussi dans son fonctionnement qui demande à chaque responsable d'accepter de travailler dans des conditions qui, compte tenu des circonstances, ne sont pas toujours celles qu'il aurait souhaitées. Originale, la M.C.E. veut le rester, c'est-à-dire conserver sa totale indépendance. Elle tient à cette indépendance, car elle a été fondée pour apporter son aide à tous les espérantistes, inorganisés ou appartenant à un groupement quel qu'il soit. Pour elle comptent seuls les mots « Esperanto » et « espérantiste » ; peu importe le vocable que chacun est libre d'y ajouter. Mais il est évident qu'aucun de ces vocables ne pourrait lui être attribué, car elle est autre chose et ne veut pas se substituer aux autres organisations mais leur apporter ce qu'elle seule est en mesure de mettre à leur disposition.

Il est parfois nécessaire de rappeler cette originalité de la M.C.E., certains amis ne voyant pas clairement sa place dans le monde espérantiste : celle d'un centre culturel, prolongement de l'action de propagande menée par les autres.

P. BABIN.

NOS JOIES

Ce sont d'abord des mariages qui nous les ont apportées :

Anita Cortès, fille de nos amis nantais, a épousé M. Musset.

Adrian Boldan, notre « peranto » en Roumanie a épousé Elena Balanescu.

Daniel Roux et Martine van Waerebek, tous deux bien connus de tous les Grésillonnais, se sont mariés en mars à Paris.

Robert Lloancy et Marie-Thérèse Juchault, si connus pour leur activité espérantiste se sont mariés en avril à Agen.

A tous nos compliments et nos vœux très sincères.

Nos amis Ciret de Tours sont les grands-parents d'un petit Stéphane, né au foyer de leurs enfants, M. et Mme Bernard Ciret de Montrouge. Nos félicitations aux grands-parents et aux parents. Nos vœux à Stéphane.

Au foyer de Félix et Pierrette Askolovitch est né un petit Maurice-Samuel. Félicitations aux parents. Tous nos vœux au petit frère d'Isabelle.

ABONNÉS BIENFAITEURS

Liste n° 4

Mme Ressort (Bouches-du-Rhône)	12,00
Mme Fraccioli (Bouches-du-Rhône)	12,00
M. Selle (Paris)	12,00
M. Jakubec (Tchécoslovaquie)	12,00
M. Liebelt (R.D. Allemagne)	12,00
M. Günther (Hongrie)	12,00
M. Seidler (Tchécoslovaquie)	12,00
M. Jonkova (Bulgarie)	12,00
M. Carlsson (Suède)	12,00
Mme Micard (Mayenne)	12,00
M. Motillon (Indre-et-Loire)	12,00
Esp-Grupo (Hongrie)	12,00
M. Grim (Tchécoslovaquie)	12,00
M. Gerrier (Paris)	12,00
Mme Quillaud (Loire-Atlantique)	12,00
M. Bourrié (Bouches-du-Rhône)	12,00
M. Igigabel (Sarthe)	12,00
M. Legros (Nord)	12,00
M. Hébert (Seine-Maritime)	12,00
M. Fourcade (Loiret)	15,00
Mlle Clavier (Rhône)	12,00
M. Massé (Savoie)	12,00
M. T.S. Kho (Pays-Bas)	12,00
Mme Leduc (Loire-Atlantique)	12,00
M. Hervouet (Hauts-de-Seine)	12,00
M. Marly (Gironde)	12,00
M. Decobert (Nord)	12,00
M. Herbert (Pas-de-Calais)	15,00
M. Lesoin (Nord)	12,00
Mme Cnudde (Nord)	12,00
Mlle Davoust (Mayenne)	12,00
Mme Bois (Ille-et-Vilaine)	12,00
M. Chagnoux (Allier)	15,00
Mlle Hédelin (Paris)	12,00
M. Eymard (Val-d'Oise)	12,00
Mme Amice (Indre-et-Loire)	12,00
Mme Jacono (Bouches-du-Rhône)	12,00
M. Juchault (Charente-Maritime)	24,00
M. Daems (Belgique)	12,00
M. Epstein (Jura)	12,00
Mlle Montagné (Eure)	12,00
Mme Luquet (Alpes-Maritimes)	12,00
Mme Caniot (Deux-Sèvres)	12,00
M. Ciret (Indre-et-Lorie)	12,00
M. Ligot (Nord)	12,00
M. Gucz (Pologne)	12,00
M. Pinchedez (Paris)	12,00
Mlle Stutzmann (Haut-Rhin)	12,00
Mme Daems (Belgique)	12,00
Mlle Pral (Rhône)	12,00
M. Raynal (Pyrénées-Orientales)	12,00
M. Braud (Loire-Atlantique)	12,00
Mme Mathé (Vienne)	12,00
M. Gallet (Isère)	12,00
Mlle Levrard (Sarthe)	12,00
TOTAL :	**681,00**

PHILATELISTES

Nous tenons à votre disposition des timbres neufs de Pologne, Roumanie, Tchécoslovaquie, U.R.S.S. Nous les vendons, *au profit de la M.C.E.*, à 50 % du prix du catalogue Yvert. Envoyez : 5, 10, 20 francs à :

Sro Giloteaux, 3, allée Béranger, 59 - CROIX
C.C.P. Lille 2 269 89

LA REVUE

Les abonnements arrivent à un rythme régulier. Nous avons enregistré un assez grand nombre de nouveaux abonnés. Merci à tous ceux qui nous aident. Il est encore possible, certainement de nous amener de nouveaux amis.

NOS PEINES

Du Japon nous est parvenue la nouvelle de la mort de Ito Saburo. Tous ceux qui ont connu Ito Saburo à Grésillon ressentiront la perte que le mouvement espérantiste japonais vient de subir. C'est le souvenir d'un très grand ami que nous avions tous gardé de lui. Nous partageons la peine de S-ino Saburo et de tous ses amis japonais.

Assemblée Générale du 31 Mars

A 10 h. 10 la séance est ouverte par M. Ciret, président de séance. Se sont excusés : Mme Micard, Mlles Levrard et Vazon, MM. Benistant, Chevalier, Philippeau, Fouski, Frangeul.

M. Daniel Roux est nommé secrétaire de séance.

Après approbation de l'ordre du jour M. Cousset donne lecture du compte d'exploitation. M. Babin le commente et répond aux questions des assistants : le stock comprend surtout la librairie et les souvenirs, le tout calculé au prix d'achat évidemment ; la diminution des rentrées séjours est surtout due à l'absence de passages de groupes pendant le deuxième trimestre de l'année. M. Cousset explique que l'augmentation marquée des charges sociales et impôts sur salaires n'est qu'apparente. En effet sur les comptes 1968 a été porté le réglement du dernier trimestre 1967 et des rappels sur les trois dernières années. La somme réelle afférente à ce chapitre est en réalité de 3 968,12 francs pour l'année 1968. Mme Cheverry demande qu'un chapitre « vente boissons » soit ouvert. M. Babin commente le bilan. Il explique que, pour des raisons de logique, financièrement la revue étant indépendante, il a dû retirer du compte et du bilan tout ce qui concerne Kulturaj Kajeroj. Cela a créé quelques difficultés qui ont pu être réglées grâce à l'aide de M. Cheverry.

Les commissaires aux comptes MM. Berthelot, Cheverry et Prévot font leur rapport et donnent quitus à M. Babin pour la tenue de ses comptes.

Le nombre de membres présents ou représentés étant bien supérieur au quorum exigé par les statuts, l'Assemblée Générale peut valablement délibérer et voter. Elle approuve le compte d'exploitation et le bilan 1968.

Lecture est faite du rapport d'activité qui est approuvé par l'Assemblée Générale.

Plusieurs résolutions sont alors présentées. L'A.G. enregistre le départ d'une sociétaire et la venue de douze. Cette augmentation porte le capital social à 75 520 frs. Les pouvoirs des personnes chargées de représenter l'association auprès des chèques postaux et de la banque sont renouvelés. L'Assemblée Générale désigne MM. Berthelot, Cheverry et Prévot, ainsi que Mme Jacquesson Josette pour contrôler les comptes de 1969.

On discute ensuite des stages 1969. Le personnel est mis en place. Malheureusement l'activité « photo » prévue pour le mois d'août doit être supprimée du programme, M. et Mme Gerrier ayant fait part de l'impossibilité où ils sont d'être à Grésillon cet été. Mme Vincent et M. Ribot assureront les cours de la première période (3 cours) qui sera administrée par M. et Mme Cheverry. Pour la Semaine Culturelle de U.F.E. M. et Mme Babin assureront l'administration. M. Babin regrette qu'aucune propagande n'ait été faite encore pour cette période dans la « Revue Française d'Esperanto ». M. et Mme Guillot s'occuperont des Vacances Internationales et Culturelles au cours desquelles M. Major, de Nouvelle-Zélande fera des conférences. Parmi les autres conférenciers on comptera Mme Cheverry et M. Métivier. M. et Mme Babin s'occuperont des Semaines Espérantistes du mois d'août. Les cours d'esperanto seront assurés par MM. Thierry, Babin et Le Magadure, la reliure par Mlle Lenel. Le professeur de vannerie n'est pas encore connu. M. Thierry guidera l'initiation au théâtre. M. Boyet assurera la direction culturelle du stage destiné aux responsables de groupes et de cours. Des cours d'esperanto seront faits.

Monsieur Bodereau continuera son travail de propagande selon le plan prévu malgré le peu de succès obtenu jusqu'à maintenant. Mme Cheverry poursuivra sa propagande auprès des groupes et organisations espérantistes de France et de l'étranger.

Le ménage jardinier-cuisinière semble plein de bonne volonté. Espérons que rien d'autre ne viendra troubler ce que ces bonnes dispositions ont de positif.

M. Babin annonce que la Hispana Esperanto-Muzeo a demandé à se jumeler avec la Maison Culturelle. Il s'agira surtout d'un échange de propagande. Le jumelage est approuvé.

La Maison s'est enrichie d'un duplicateur Roneo offert par le Groupe espérantiste de Marseille, et d'un couteau électrique offert par Mme Micard. L'Assemblée remercie chaleureusement les espérantistes marseillais et Mme Micard. Achat a été fait d'un aspirateur pour faciliter le travail du personnel.

Enfin M. Babin explique pourquoi il a dû décider le forage d'un nouveau puits. Le niveau de l'ancien puits a baissé dans des proportions très inquiétantes qui faisaient redouter un manque d'eau pendant la saison d'été. Le puisatier devant quitter la région pour un certain temps les travaux ont dû être exécutés avant même l'Assemblée Générale. Coût probable 4 000,00 francs. Ces travaux feront disparaître la menace constante depuis quelques années du manque d'eau. Un second réservoir sera mis en place.

M. Ciret, l'ordre du jour étant épuisé, remercie les présents et déclare la séance levée.

Le secrétaire de séance
Daniel ROUX.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
49 - Baugé
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Le catalogue a paru dans le dernier numéro. Un autre exemplaire peut vous être envoyé sur demande.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,40 F.
couleur :	0,50 F.
Cuillères de collection : 9,00 et	12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	2,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.
Disque 30 cm avec chansons de Bob Dylan interprétées par le Duo Espera :	25,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 5,00 F.).

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de **P. Babin**
Prix : **8,50 F.**

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

